W tym czasie babcia Lidki zginęła w wypadku drogowym. Dziewczynka prawie jej nie знаła i oczywiście nie rozumiała, co to jest śmierć, ale na komodzie stała fotografia babci i świeczka, a mama często jej powtarzała, że babcia odeszła do aniołków.

Później, kiedy Lidka już dobrze nauczyła się chodzić i mówić, wesoło biegła do wchodzącego dziadka i witała go opowiadaniem o nowych zabawkach i kredkach i pokazywała swoje rysunki. Już nie nazywała dziadka „djadja”.

Kiedy nastąpiła wirusowa epidemia, Lidka nie widziała dziadka przez kilka miesięcy. Czasami tylko rozmawiała z nim przez telefon razem ze swoim tatą.

Na początku jesieni dziadek zachorował. Cierpiał na kaszel i ból gardła. Choroba trwała już ponad dziesięć dni i nie chciała ustąpić. Kiedy tata i Lidka zadzwonili do dziadka, Lidka powiedziała:

- Dziadku, ty nie możesz iść do aniołków.
- Dlaczego nie?
- Bo ja bym płakała.
- No to nie mogę.

Distingo
en la literatura konkursa
„Esperanto ligas homojn.
Pandemio – neĉiutaga
ĉiutageco”

Aŭtoro: Jean-Claude Roy

Ĉu dancado post kantado?

Sanitara kordono ĉirkaŭ ĉiu homo ekde la 17a de marto 2020, unu tagon post solena kaj pompa deklaracio de la ŝtatprezidento. Li aŭdacas oferi ekonomion, ĉiujn socialajn, kulturajn aferojn. Ĉiuj lernejoj haltas. Tamen en 1968 kaj ĝis 1970, okazis sama viruskontagio. Hongkonga gripo ĝi nomiĝas. Neniu memoras. Neniu surmetis maskon. Nia socio kaj la politika potenco evoluis. Certe amaskomunikiloj efikas. Homoj timas. Registaro ne povas ignori. Registaro decidas agi! Savi vivojn, vivojn de olduloj. Ĉefe homoj pli ol 65-jaraj estas en danĝero. La aliaj suferas kvazaŭ gripojn kaj la plej junaj estas sensimptomaj. Mi pensas pri Néstor, mia korespondanto en Esperanto. Li vere vivas en izolo en malliberejo apud Madrido. Li vivas en izolo ĉiutage de pluraj monatoj! Mia izolo ne estas izolo: mi rajtas eliri ĉiutage dum unu horo por promenado ĉirkaŭ mia hejmo, tamen ne pli ol unu kilometron for. Kaj etendiĝas tereno ĉirkaŭ la domo. Privilieulo! Milionoj da homoj en altaj domkonstruaĵoj ne havas tiun bonsancon simple spiri sub ĉielo. Al mi mankas nenio! Estiel emerito mia situacio estas enviinda! Ĉiuokaze mia pensio

estas pagata! La izolo ne estas nur por emeritoj... kvankam kelkaj fakuloj pri medicino volas enfermi nur la oldulojn! Por eliri, estas devige montri paperon kiu indikas la celon kaj pravigas la rajton! Ne estas permesate meti rubaĵon en la ujon 80 metrojn for de mia hejmo. La municipaj policanoj, kaŝataj malantaŭ la distribuilo de terpomoj, gvatas. Kaj la monpuno altas: 135 eŭrojn ĝi kostas! Freneze! La monbileta distribuilo ne estas atingebla! pli ol unu kilometron for. Eble unu kilometron kaj ducent metrojn! Freneze! Ne maltrafi la televidelementon, kiu ĉiutage parolas pri ĜI, Kovido, la eteta besteto tiel minaca! Kaj kajto ne povas ŝirmi! «C dans l'air» nomiĝas la elsendo. Laŭvorte traduku per «Estas en aero»!!! Jes, kovido cirkulas en aero! Pro tusadoj! Pardonu min! Malbona ŝerco! Eble psika efekto de ĜI sur mia cerbo! Fakuloj parolas kaj parolas. Admonas, avertas, antaŭavertas, kvakas. Kritikas, kverelas, ofendintence pikas! Kaj Laurel ridetas! Tiel mi nomas iun infektologon aŭ virusologon; mi ne scias; ĉiuokaze iun «logon». Mi nomis ŝin Laurel. De Laurel kaj Hardy, tiu fama duopo de humuristoj usonaj furorinta en la tridekjaroj. Kaj tiu medicinistino similas Laurel kiam ŝi ridetas post deklaro pri niaj devigaj sintenoj kontraŭ kovido. Rideto granda, kiu kuras de ŝia maldekstra orelo ĝis la dekstra, eble malpli humura ol tiu de Laurel. Eble rideto kiu signifas: atentu bone! Ne faru stultaĵojn! Ne petolu! Komprenu kaj obeu! Ŝi ne intencas logi! Kion ni komprenas per tiuj elsendoj ripetataj? Certe ke malfacilas Ĝin kompreni. Ĝi tre silente agas kaj mortigas. Ĝi ne intencas klarigi kiel kontraŭbatali kaj venki. Ni komprenas ke libereco ne okazos morgaŭ. Disciplino kaj iam vakcino por la fina venko! Punkto fino. En tiaj kondiĉoj, sen grandaj delokiĝoj for de sia hejmo, malfacilas sporti. Mi ne emas sporti. Sed kelkaj najbaroj jes. Spektaklo de homoj, kiuj kuras malantaŭ mia tereno. Onidire ĉie en Francio homoj kuras rondire ĉirkaŭ sia hejmo. Mi vidas la tiel sveltan, tiel magran, tiel diafanan najbarinon kuri malantaŭ la herbejo. Ŝi tiel freneze kuras! Certe por malstreĉigo. Pro tiu diabla kovido, ĉiuj francoj kaj la politikistoj malkovras, kiuj estas nemalhaveblaj en la dungitaro: purigistoj, rubistoj, laboristoj en ĉiovendejoj, kamionistoj ktp.

ĉiuj homoj malbone pagataj, malbone konsiderataj, krom la servistaro en malsanulejoj ĉiuvespere precize je la 20a brue aplaŭdata. De la 17a de marto pli ol dek milionoj da laboristoj ĉesis labori sen maldungo. La franca sansistemo, la sanstatoj de ĉiuj francoj kaj de ĉiuj alilandanoj, kiuj vivas kaj laboras en Francio, meritas ĉiujn oferojn. Iom ŝokas min la ŝtatprezidanto. Li alparolas nur francojn! «Estimataj sampatrujanoj» «Francinoj kaj francoj»! Tamen la mal-facilaj decidoj pri batalo kontraŭ kovido validas por ĉiuj! Aŭ ni ĉiuj kune venkos, aŭ kovido longtempe amuziĝos per niaj pulmoj. «Kostu kiom ajn»! La sociala Ŝtato decidas pagi ĉiujn, kiuj ĉesas labori, ĝis 87% de ĉiu salajro. Onidire la ŝtataj kestoj estas malple-naj. La ŝtatoŝuldo estas abisma, pli ol du mil miliardoj da eŭroj. De kie venas tiuj 135 miliardoj da eŭroj por pagi la salajrojn? Mistero! Almenaŭ por mi! «Ni militas» deklaris plurfoje la prezidanto, kaj el lia bušo tio signifas, ke Francio pretas preni ĉiujn eblajn rime-dojn por batali, ĉefe por eviti ke lavango da infektitoj plenštropu la sanservojn. Sen armiloj, protestas multaj, sen maskoj, sen testoj kaj sen vakcino antaŭ longa tempo. Nepras rapidi, ĉar la viruso ne intencas haltigi sian disvolvon. Tiu militema alparolo enhavas alian celon: konvinki la ribelemajn francojn, ke nepras submetiĝi al tiuj liberlimigaj rimedoj. Mirakle, francoj obeis, krom kelkaj milionoj tamen, ekzemple pli ol miliono da riĉaj parizanoj, kiuj profitis la mallongan tempodaŭron inter la alparolo kaj la efektiva komenco de la izolo por fuĝi al sia feriloko en vilaĝo aŭ ĉe la marbordo! Soli-dareco! Ĉiu por si, por ĉiu di! Francio pene gajnis la unuan batalon en printempo 2020 kaj dum somero ni gaje petolis, festis, kune drinkis, sunumis, amasiĝis. Venas la dua batalo en aŭtuno. Ni relegu la fablon de Lafonteno kaj la rebato de la formiko-kovido: «Vi kan-tis, nu bone, kaj nun bonvolu danci!». Kaj Laurel plu ridetas!

Wyróżnienie
w konkursie literackim
„Esperanto łączy ludzi.
Pandemia – niecodzienna
codzienność”

Autor: Jean-Claude Roy

Zatańczymy po śpiewie?

Od 17 marca 2020 r. kordon sanitarny wokół każdego obywatela, dzień po uroczystej i pompatycznej przemowie prezydenta Francji w związku z wybuchem pandemii koronawirusa. Odważył się on zaoferować wszelkie ekonomiczne, socjalne zabezpieczenia, włącznie z dostępem do kultury. Wszystkie szkoły zamknięte. Jednakże podobne zagrożenie już było, w 1968 i 1970. Grypa z Hongkongu, tak ją nazwano. Nikt tego nie pamięta. Nikt nie zakładał masek. Nasze społeczeństwo i siła polityczna ewoluowały.

Z pewnością media mają wpływ. Ludzie boją się. Rząd nie może tego zignorować. Rząd postanawia działać. Ocalać życie, życie staruszków. Głównie ludzi po 65. roku życia, gdyż oni są najbardziej zagrożeni. Inni przechodzą chorobę łagodniej, coś jak grypę, a młodzi nie mają objawów. Myślę o Nestorze, moim esperanckim korespondencie. On naprawdę żyje w izolacji, w więzieniu koło Madrytu. Żyje izolowany codziennie od wielu miesięcy! Moja izolacja nie jest izolacją: mam przecież prawo codziennie wyjść na godzinny spacer koło domu. Mimo że nie mogę oddalić się na więcej niż kilometr od niego. I dookoła domu jest miejsce. Czyli jestem uprzywilejowany! Miliony ludzi w wieżowcach sięgających chmur, nie mają tego szczęścia, by zwyczajnie pooddychać pod gołym niebem. Mnie niczego nie brakuje. Mój emerycki żywot godzien jest

pozazdrosczenia. W każdym razie moja emerytura jest wypłacana. Izolacja jest nie tylko dla staruszków. Choć kilku znawców medycyny chciało zamykać tylko osoby starsze. Aby wyjść, trzeba było obowiązkowo pokazać papier ze wskazaniem uzasadnionego celu wyjścia. Nie wolno wynieść śmieci do kontenera, który znajdował się 80 metrów od mojego domu! Straż miejska, schowana za automatem z ziemniakami, obserwuje... Mandat jest wysoki: kosztuje 135 euro. Obłęd! Bankomaty niedostępne... bo odległe o więcej niż kilometr! Może kilometr i 200 metrów... Wariatwo! Tylko nie przegapić telewizyjnych wiadomości, które codziennie mówią o tym. Kowidek, taka mała bestyjka, a taka groźna! Żadnego latwca ochronnego nie ma! „C dans l'air” nazywają się wiadomości. Tłumacząc dosłownie: Jest w powietrzu! Taaaak, kowidzisko krąży w powietrzu! Z powodu kasłania! Wybaczie kiepski żart... Może psychiczny efekt w moim mózgu! Specjaliści mówią i mówią... Upominają, alarmują, ostrzegają, kraczą. Krytykują, kłócą się, świadomie obrażają, wzajemnie wbijają sobie szpilki! A Flip się uśmiecha! Tak ochrzciłem jedną wirusolożkę czy epidemiologę, w każdym razie jakąś „lożkę”. Nazwałem ją Flip. Od Flipa i Flapa. To znani do dziś amerykańscy komicy, którzy furorę zrobili w latach 30. A ta lekarka właśnie przypomina Flipa, kiedy uśmiecha się po wypowiedzi o naszych postawach wobec koronawirusa. Uśmiech od ucha do ucha, być może mniej zabawny niż Flipa. Może uśmiech miał znaczyć: strzeż się! Nie rób głupstw! Nie hulaj! Zrozum i bądź posłuszny. Ona nie zamierza wabić. Co rozumiemy po tych wielokrotnie powtarzanych wiadomościach o wirusie? Że trudno go zrozumieć. On bardzo cicho działa i zabija. On nie zamierza wyjaśnić, jak z nim walczyć i zwyciężyć. Rozumiemy, że wolność nie nadjdzie jutro. Dyscyplina, a potem szczepionka na ostateczne zwiększenie. I kropka! W takich warunkach, bez dużych przemieszczeń z dala od domu, trudno uprawiać sport. Ja akurat nie jestem zbytnim zwolennikiem ćwiczeń. Lecz kilku sąsiadów tak. Oglądam ten cyrk, kiedy ludzie przemykają tuż za moim płotem. Wydaje się, że we Francji wszędzie biegają dookoła swoich domów. Patrzę na moją

tak szczupłą, chudą, przezroczystą sasiadkę, która wręcz obiąknięto biega z tyłu za trawnikiem. Pewnie by się odstresować. Przez tego diabelskiego kowida wszyscy Francuzi, oczywiście politycy też, odkrywają, kto tak naprawdę jest niezbędnym spośród ludu pracującego: sprzątaczki, śmieciarze, sprzedawcy w sklepach, kierowcy ciężarówek, itp. Nawiastem mówiąc, wszyscy oni są źle opłacani, nieszanowani. Oprócz służby medycznej, która każdego wieczoru dokładnie o 20.00 jest rzesiście oklaskiwana. Od 17 marca ponad 10 milionów robotników zaprzestaje pracy, są na przymusowym postojowym, ale bez zwolnienia. Francuski system zdrowia, stan zdrowia Francuzów i obcokrajowców, którzy mieszkają i pracują tutaj, zasługują na wszelkie poświęcenie. Trochę zaszokował mnie prezydent, który przemawiał tylko do Francuzów. „Szanowni Rodacy!” „Francuzki i Francuzi!” A przecież trudne decyzje związane z walką z kowidem dotyczą wszystkich. Albo razem zwyciężymy, albo wirus długo będzie bawił się naszymi płucami. „Niech to kosztuje, ile chce!” Państwo socjalne zdecydowało płacić postojowe w wysokości 87% każdej pensji. Wydaje się, że państwową kasa jest pusta. Dług państwo to prawdziwa studnia bez dna, ponad 2 tysiące miliardów euro. Skąd wezmą te 135 miliardów na wypłaty? Wielka niewiadoma, przynajmniej dla mnie. – Walczymy! – wielokrotnie deklarował prezydent. Z jego ust znaczy to, że Francja gotowa jest podjąć wszelkie możliwe środki na batalię, głównie, by uniknąć lawiny zakażeń, które zablokowałyby służbę zdrowia. Wielu protestuje, bez broni, bez masek, bez testów, bez szczepionki wkrótce. Trzeba się spieszyć, bo wirus nie zamierza odpuścić. Jednak takie przemówienia w duchu wojny mają inny cel: przekonać skłonnych do rebelii Francuzów, że koniecznie trzeba podporządkować się ograniczeniom. W jakiś cudowny sposób, Francuzi byli posłuszni. Oprócz kilku milionów. Na przykład więcej niż milion bogatych paryżan skorzystało z krótkiego czasu między przemówieniem a wprowadzeniem restrykcji i schroniło się w swoich podmiejskich willach lub nad morzem. Solidarność! Każdy troszczy się o siebie, Bóg troszczy się o wszystkich! Francja z trudem wygrała

pierwszą bitwę wiosną 2020 roku, a latem wesoło swawoliliśmy, święto-waliśmy, wspólnie piliśmy, opaliliśmy się, gromadziliśmy się. Nadchodzi druga bitwa – jesienią. Przypomnijmy zatem bajkę La Fontaine'a i ripostę mrówki-kovida: „– Śpiewałeś? Bardzo dobrze! Tańcujże teraz!” A Flip wciąż się uśmiecha.

Distingo
en la literatura konkurso
„Esperanto ligas homojn.
Pandemio – neĉiutaga
ĉiutageco”

Aŭtoro: Maria Rosaria Spanò

KIAM ANKROJ NEATENDITE FALAS

Hodiaŭ, mi denove enaviadilas.

Post pluraj monatoj, mi revenas al mia naskiĝurbo.

Ne vere hejmen.

„Hejmo estas, kie oni ĵetas sian ankron”, mi legis iam.

Dumfluge, inteligenta tempouzado ne nepras. Sufiĉas rigardi eksteren. Navigi perrigarde.

Navigi. Libere. Kiel Sinbado, aŭ kiel Uliso, ruzaj maraventuremuloj kiuj ĉiam fascinis min.

Iusence, mi mem similas al maristo.

Infanaĝe, mi vojaĝis nur per fantazio.

Kiam realo ne suficiis, mi elpensis alian, rakontindan realon. Libroj nutradis mian imagpovon, kiel limfo.

Iam, mi malkovris kion signifas vojaĝi, plongi en la mondon, lerni propraokule. Tio estis por mi vivšanĝa revelacio.

Ekde tiam, samkiel maristo reveninta post longa navigado, mi ekrakontis al aliaj miajn travivaĵojn. Mi plurevis, kaj kelkfoje, feliĉe,

mi revigis aliajn. Vojaĝoj nutradis mian vivon, kiel limfo, samkiel daŭre faras libroj.

Vivo sen vojaĝoj estis eĉ neimagebla.

Sed iam, antaŭ kelkaj monatoj, mia ankro neatendite falis, kaj alkročiĝis al la marfundo, haltigante mian ŝipon en sekura, tamen ankoraŭ ne sufice familiara haveno.

Kaj mi simple *ne povis akcepti tion*.

Estas nekredeble, kiom makiavelaj povas esti la memtrompoj kiujn nia meno nekonscie artifikas por savi sian ekvilibron.

Plurfoje mi duonsekrete revis pri pli da stabileco, spite mian vojaĝemon. Kelkfoje mi konstatis, ke tiaspeca vivmaniero elsuĉas tro da korpa kaj mensa energio. Mi revis pri pli da *ordo*. Pri pli *nor-mala ciutageco*.

Do, jen la preteksto.

Ĉio iros bone, obsede kriĉadis la slogan, ornamite de ĉielarkoj kaj rozkoloraj intencoj.

Ĉio jam iras pli bone, mi ruze interpretis, laŭ mia utilo.

Kiam la tutmonda trudizoliĝo ekklikigis, landon post lando, iam mi ensaltis radion, por supervenki tiun neeltenoble bruan silenton, kiu akute siblis en miaj oreloj.

Poste, instinkte, kiel aŭtomato, mi metis mian valizon, post malplenigo (ofte ĝi kuŝis duonplena surplanke), sur la ŝrankon.

Ne temis pri hazarda, sensignifa gesto: ja oni metas tien la Krist-naskan arbon en januaro. Oni surŝrankigas aĵojn *neuzotajn dum longa tempo*.

Plia nehazardaĵo: en mia valizo, kuŝas de jaroj eta amdonaco, kiu akompanis min tra la tut-a mondo: paperŝipeto.

Homoj ĉirkaŭ mi, aparte miaj malproksimaj proksimuloj, kom-pateme mesaĝis al mi, dum tiu periodo, kvazaŭ ili emus kunfunebri. Sed pro kio? *Neniu forpasis, inter ni. Mi fartas bone, estas aliaj multe pli gravaj problemoj en la mondo, nun. Miaflanke, finfine estas ordo. Finfine estas normaleco.*

Ili supozis, ke mi suferas pro vivsanĝo, kaj miaj pozitivaj, eĉ euforiaj reagoj ŝajne sonis perturbaj, por ili. Mia vivo ne devis elteni

traŭmatajn skuojn, feliĉe, sed ili ne povis kompreni, kiel ŝangi vivkutimojn de unu tago al la alia povis efektiviĝi tiel nature, senstreĉe, kiel la sorĉo en la fabelo pri la Bela Dormantino en la arbaro, kiam ĉiu en la kastelo endormiĝas tuj post la princino.

Ili ne povis scii, mi mem ne povis scii, ke io ene de mi *klare vidis la ankron fali* el mia ŝipo, aŭ almenaŭ *aŭdis la bruon de ĝia abrupta enakviĝo*, sed ke ĝi rapide formovis tion.

Ili ne povis scii, ke io ene de mi *plene konsciis pri kio okazis, sed ke tio simple estis neakceptebla*.

Tial mi ŝajnigis, ke nenio okazis; mi ŝajnigis, ke ĉio pliboniĝis, ke mi ne priploras mian antaŭan vivmanieron, ke mi ne sopiras povi moviĝi senzorge, eĉ nur por povi revidi mian originan familion.

Almenaŭ dum kvin monatoj mi tradormis mian oran narkozon, kaj ĉio funkciis mirinde bone: pli da fokusiĝkapablo, pli da laboro liverita, pli da klerigo. Pli da muziko, por kontraŭbatali tiun kriantran silenton. Pli kaj pli da izoliĝo. Ĉio estis fora, kiel palaj, svagaj memoroj: vojaĝoj, gefamilianoj, geamikoj, ĉeestaj renkontiĝoj.

Jes, dum tiu paradiza parentezo ja okazis kelkaj forgesoj, kelkaj momentaj forglitoj de la memorkapablo, kelkaj koŝmaroj. Sensignifaj epizodoj.

Fronte al furioza, tutmonda sankrizo, mi *neniam* ploris. *Neniam*. Emocioj estis forviŝitaj, kune kun memoroj. Kaj mi eĉ ne rimarkis tion.

Tamen, sufiĉis iom pli da streĉo ol kutime, kaj la tuta mehanismo, tiu perfekte agordita horloĝo, ekmisfunkciis. Ne laŭgrade, sed abrupte. Pli precize, ĝi eksplodis. Senbrue. Doloro enrompis en mian karnon, kvazaŭ vitrosplitoj kaj radetfragmentoj trapasus min. De interne.

Doloro estas foje kiel akriga ŝtono; ĝi fajnigas la komprenkapblon.

Mi fine ekkomprenis, kial miaj proksimuloj montris kunfunebrempon al mi.

Car io neripareble forpasis.

Car mia ankro neatendite falis, kaj alkroĉiĝis al la marfundon, haltingante mian ŝipon.

Ĉar mia tiom prirevata „normaleco” simple ne estas normala.

Ĉar vojaĝado, kio plej ĝojigis min iam, jam iĝis sufoka angorfonto.

Onidire, ĉio pasas. Eĉ krizoj iel traviveblas. Vundoj foje postlasas cikatroyn, foje eĉ ne.

Plurfoje mi aludis pri ordo. Krizoj ja havas tian povon: ili metas ĉion, kaj ĉiujn, en la ĝustan lokon. Jen kio estas hejmo, jen kio ne plu estas; jen kio vi estas, jen kio vi ne plu estas; jen homrilatoj kiuj fortikiĝas, jen tiuj kiuj estingiĝas. Tute nature.

Ne sufiĉas tamen nur konstati. Oni devas rigardi. Inventari. Jen kio pluflosas, jen kio dronis.

Fine, eblas ion kreli, el krizoj. Eblas distili vortojn el ili, montri tiujn vortojn al alies oreloj kaj okuloj, senvualigante intimajn, sendefendajn kordojn.

Sed tio postulas kuraĝon: la kuraĝon rakonti, kiam kuraĝo mankas.

Kiel atesto, mia valizo plukuſas sur la ŝranko.

Kaj, en ĝi, mia fidela paperŝipeto.

Wyróżnienie
w konkursie literackim
„Esperanto łączy ludzi.
Pandemia – niecodzienna
codzienność”

Autor: Maria Rosaria Spanò

NIESPODZIEWANIE RZUCANE KOTWICE

Dziś znów jestem w samolocie.
Po wielu miesiącach wracam do rodzinnego miasta.
W zasadzie nie do domu.
„Dom jest tam, gdzie rzuca się swoją kotwicę”, czytałam kiedyś.

Podczas lotu mądro spędżanie czasu nie jest konieczne. Wystarczy patrzeć na zewnątrz. Lecieć wzrokiem.

Lecieć. Wolno. Jak Sindbad, albo jak Ulisses, przebiegli poszukiwacze przygód, którzy mnie zawsze fascynowali.

W pewnym sensie sama przypominam marynarza.
W dzieciństwie podróżyowałam wyłącznie w wyobraźni.
Gdy rzeczywistość nie wystarczała, wymyślałam inną, wartą opowiedzenia. Książki żywili moje imaginacje niczym limfa.

Pewnego razu odkryłam co oznacza podróżowanie, nurkowanie w świecie, uczenie się na własne oczy. To objawienie zmieniło moje życie.

Od tej pory, niczym marynarz powracający z długiego rejsu, opowiadałam innym o swoich przeżyciach. Snułam kolejne marzeń i nieraz, na całe szczęście, zarażałam nimi innych. Podróże dały sił mojemu życiu jak limfa, jak wciąż dają je książki.

Życie bez podróży jest wprost niewyobrażalne.

Któregoś razu jednak, kilka miesięcy temu, moja kotwica opadła nieoczekiwanie i przywarła do dna morza, zatrzymując mój statek w bezpiecznej, choć wciąż nie dość poznanej zatoce.

A ja wręcz *nie mogłam tego zaakceptować*.

To niewiarygodne, jak makiaweliczne może być uleganie złudzeniom, którymi nieświadomie zwodzi nas umysł, aby zachować swą równowagę.

Wielokrotnie, ponieważ sekretnie, marzyłam o większej stabilności, na przekór zamiłowaniu do podróży. Czasem twierdziłam, że taki styl życia wysysa zbyt wiele energii duszy i ciała. Marzyłam o większym *porządku*. O *normalniejszej codzienności*.

Oto i pretekst.

Wszystko się uda, jak opętane wydzierał się hasło, ozdobione tęczami i różowymi życzeniami.

Wszystko już się udaje, sprytnie interpretowałam na swoją korzyść.

Kiedy ogarniający świat mechanizm blokady zaczął działać w kolejnych krajach, włączylam pewnego razu radio, żeby pokonać tę nieznośną, hałaśliwą ciszę, która ostro syczała mi w uszach.

Następnie, odruchowo, jak automat, odłożyłyłam moją walizkę, opróżniwszy ją (często leżała częściowo wypełniona na podłodze), na szafę.

Nie chodziło o przypadkowy, pozbawiony znaczenia gest: tam przecież odkłada się w styczniu świąteczną choinkę. Na szafę wrzuca się przedmioty, których *nie będziemy używać przez wiele miesięcy*.

Jeszcze jedna nieprzypadkowa rzecz: w mojej walizce od lat spoczywa malutki prezent, dowód miłości, który był ze mną na całym świecie: papierowa łódeczka.

Otaczający mnie ludzie, przede wszystkim odlegli bliści, wspominając pisali do mnie w tym okresie, jakby chcieli współczuć. Ale czego? Spośród nas nie odszedł nikt. Czuje się dobrze, na świecie są dziś o wiele ważniejsze problemy. U mnie nareszcie jest porządek. Nareszcie nastąpała normalność.

Wydawało się im, że cierpię przez życiowe zmiany, a może pozytywne, euforyczne wręcz reakcje dla nich brzmiały jak zakłócione. Moje życie, całe szczęście, nie musiało znosić traumatycznych wstrząsów, a mimo to nie potrafili zrozumieć w jaki sposób zmiana przyzwyczajeń z dnia na dzień mogła dokonać się tak naturalnie, bezstresowo, niczym czar w baśni o Śpiącej Piękności w lesie, gdzie wszyscy w zamku zasypiają zaraz po księżniczce.

Nie mogli oni wiedzieć, sama nie mogłam, że coś we mnie *w jasny sposób widziało opadanie kotwicy* mojego statku, albo co najmniej *słyszało plusk jej nagiego zanurzenia*, ale natychmiast to wycofało.

Nie mogli wiedzieć, że coś we mnie miało pełną świadomość tego, co się działało, ale że było to po prostu nie do przyjęcia.

Dlatego pozorowałam, że nic się nie stało; udawałam, że wszystko się poprawiło, że nie opłakuję poprzedniego stylu życia, że nie tęsknie za swobodnym przemieszczaniem się, nawet po to, by zobaczyć rodzinę, z której pochodzę.

Co najmniej pięć miesięcy przespałam pod swoją złotą narkozą, a wszystko działało niezwykle dobrze: więcej umiejętności skupienia, więcej wykonanej pracy, więcej nauki. Więcej muzyki, by przezwyciężyć tę krzyczącą ciszę. Coraz więcej i więcej izolacji. Wszystko było odległe, niczym blade, rozmyte wspomnienia: podróż, krewni, przyjaciele, odwiedzone spotkania.

Tak, temu rajskaemu wtrąceniu towarzyszyło kilka chwil zapomnienia, kilka defektów pamięci, kilka koszmarów. Nieistotne epizody.

Stojąc naprzeciw wściekłego, światowego kryzysu zdrowia *nigdy* nie płakałam. *Nigdy*. Emocje zostały wytarte wraz ze wspomnieniami. I nawet tego nie zauważałam.

Wystarczyło jednak nieco więcej stresu niż zwykle, a cały mechanizm, ten doskonale nastrojony zegar, zaczął działać źle. Nie stopniowo, tylko nagle. Konkretnie mówiąc – wybuchł. Bezdźwięcznie. Ból włamał się w moje ciało, jak gdyby przeszły mnie szklane drzazgi i fragmenty zębatach kółek. Od środka.

Ból przypomina czasem osełkę; wyostrza zdolność pojmowania.
Wreszcie zrozumiałam, że bliscy obchodzili wraz ze mną żałobę.
Bo coś nieodwracalnie przeminęło.

Bo moja kotwica opadła nieoczekiwanie i przywarła do dna morsza, zatrzymując mój statek.

Bo „normalność”, o której tak marzyłam, po prostu nie jest normalna.

Bo podróżowanie, które dawniej mnie tak cieszyło, stało się źródłem duszących lęków.

Mówią, że wszystko mija. Przeżyć da się nawet kryzys. Rany czasem zostawiają blizny, a czasem nawet nie.

Wspominałam wielokrotnie porządek. Kryzsy posiadają taką zdolność: umiesczają wszystko, i wszystkich, na właściwym miejscu. Oto, czym jest dom, oto, czym już nie jest; oto, czym jesteś, i oto, czym już nie jesteś; oto relacje międzyludzkie, które ulegają wzmacnieniu, i oto te, które gasną. Zupełnie naturalnie.

Nie wystarczy jednak tylko stwierdzać. Należy obserwować. Inwentaryzować. To kopie dalej, to utonęło.

Na koniec, z kryzysu można coś stworzyć. Można wydestylować słowa, pokazać je uszom i oczom innych, odsłaniając intymne, bezbronne struny.

Ale to wymaga odwagi: odwagi do opowiadania, gdy odwagi brakuje.

Dowodem jest moja walizka, która wciąż leży na szafie.

A w niej – moja papierowa łódeczka.

Z esperanta tłumaczył Przemysław Wierzbowski

Distingo
en la literatura konkursو
„Esperanto ligas homojn.
Pandemio - neĉiutaga
ĉiutageco”

Aŭtoro: Viana Paulo Sergio

KVARANTENO

Tio estis mia unua dimanĉo post la decido izoliĝi hejme. Hieraŭ, la informoj per televido kaj interreto estis katastrofaj: la pandemio, kiel grandega, nedetenebla cunamo, atingis la tutan mondon kun sia timiga minaco. La sola rimedo por malrapidigi ĝin estas: „Restu hejme!”. Mi decidis obei. Mi vekiĝis frue kaj mire konstatis, ke la vetero estas tre agrabla, la ĉielo impone blua kaj la temperaturo milde varmetas. Perfekta dimanĉo por promeno... en la hejmo, de la ĝardeneto al la vizitācambro kaj returne.

Kiam mi sidiĝis por kafo kaj buterpano, eksonis la sonorilo. Hmm, frumatena tintado! Mi venis al la enirejo. Sur la trotuaro, antaŭ la krado el metalaj stangoj, staris virineto. Mi iris al ŝi kaj de interne mi demandis, kion ŝi volas. Ŝi respondis per tiel malforta voĉo, ke mi ne sukcesis kompreni. Mi petis, ke ŝi parolu pli laŭte, kvankam estis evidente, ke ŝi estas almozulino:

– Ĉu vi bonvolas doni al mi ian helpon? – nun mi perceptis, ke la mallaŭteco de ŝia voĉo parte estis kaŭzita de honto. – Pardonu, ke mi ĝenas vin.

Ŝi estis tre malgrassa virino. Malalta, pala, kun grizaj malabundaj haroj falantaj de ovala kapo klinita antaŭen. Ŝia vizaĝo estis sulkoplena. La malhela dentaro aspektis elsaltanta, kvazaŭ la senkar-na bušo ne sukcesis enteni ilin. Mi klopo-dis kalkuli, laŭ ŝia ekstera aspekto, ŝian aĝon. Si estis unu el tiuj personoj, kiuj nepre tro frue maljuniĝis. Eble sesdekjara, kun aspekto de sepdekjarulo. Cetere, ĉu gravas ŝia aĝo? Ŝian malvastan bruston, sur kiu oni ne povus diveni, ke troviĝas mamoj, estis plata kaj anguleca. Ŝiaj ŝultraj ostoj staris kiel pintoj ĉe la supraj ekstremoj de la trunko, flanke de la tre maldika kolo. Kaj la okuloj estis senkoloraj, eble inter grizo kaj bruno, kun blanka aŭreolo ĉirkaŭ la pupilo. Ŝin kovris griza eluzita ĉemizo, kies tekso discedis en iuj punktoj; la jupo, longa ĝis la mezo de la kruroj, jam ne montris koloron.

Dum la tempo de ĝeneral-a socia izoliĝo pro pandemio, almoz-peti estas eĉ pli malfacile, ĉar oni preskaŭ ne trovas homojn sur-strate. Mizero fariĝas pli nigra ol kutime. La socio devas helpi, ĉar aŭtoritatuloj malrapidas, tro okupitaj en siaj palacoj.

– Atendu iomete, mi pretigos ion – mi respondis, preskaŭ same honte kiel ŝi. Si mallevis la kapon ankoraŭ kelkajn pliajn centime-trojn.

Mi eniris la domon, preparis etan lunĉon. Frukton, buterpanon, plastan glason kun laktokafo. Kaj mi aldonis kelkajn monerojn. Ĉe la alia flanko de la ferkrado, ŝi volonte emis preni ilin. Pro honto, mi ne transdonis la etan pakajojn tra inter la ferstangoj. Mi malfermis la pordon kaj de pli proksime ŝi prenis ĝin. Ankoraŭ hontante, mi revenis internen kaj fermis la pordon de la stangobaro. Si ne tuj foriris. Si rigardis jen la plankon, jen min, kaj mi supozis, ke ŝi volas diri ion per sia preskaŭ neaŭdebla voĉo. Mi iom atendis, interne. Fine ŝi murmuris:

- Kia stranga afero, tiu viruso!...
- Jes, terure.
- Ĉu tio daŭros longe?
- Kiu scias?...
- Estas malfacile por ni.

– Mi povas imagi. Granda sufero.

Ŝi denove silentis, mediteme. Ŝajne ŝi serĉis respondeojn sur la pavimplakoj de la trotuaro. Post kelkaj sekundoj, ŝi denove rigardis min kaj eĉ pli mallaŭte diris:

– Vi estas bonodora, parfuma.

Mi konsterniĝis! Ĉu mi bone aŭdis? Bonodora, mi? Mi ne sciis, kion respondi. Tuj poste ŝi foriris, per malrapidaj, treniĝantaj paŝoj. Mi revenis al mia matenmanĝo penseme. Mi neniam ŝmiris parfumon sur min, mi ne kutimas. Mi apenaŭ lavis la vizaĝon hodiaŭ post la vekiĝo, per mia ordinara tualetsapo.

Bonodora? Ĉu mi bone aŭdis?

Wyróżnienie
w konkursie literackim
„Esperanto łączy ludzi.
Pandemia – niecodzienna
codzienność”

Autor: Viana Paulo Sergio

Kwarantanna

To była moja pierwsza niedziela po powzięciu decyzji o domowym odosobnieniu. Wczorajsze informacje z telewizji i radia były katastrofalne: pandemia jak wielkie tsunami ogarnęła świat siejąc przerażające zagrożenie. Jedyny środek aby ją spowolnić to polecenie: „Zostań w domu”. Zdecydowałem się być posłusznym poleceniu.

Obudziłem się wcześnie i ze zdziwieniem stwierdziłem, że pogoda jest przepiękna, niebo imponująco niebieskie, a temperatura łagodnie ciepła. Doskonała niedziela na spacer... wewnątrz domu, potem z ogródka do salonu i znów na zewnątrz.

Kiedy usiadłem, aby wypić kawę i zjeść kanapkę, zadzwonił dzwonek. Hmm, to poranne brzęczenie! Wyszedłem do drzwi wejściowych. Na chodniku, przed płotem z metalowych prętów, stała kobietka. Podszedłem do bramki pytając czego to ona ode mnie chce. Odpowiedziała tak słabym głosem, że nie udało mi się zrozumieć. Poprosiłem, aby mówiła głośniej, chociaż jasnym było, że jest żebraczką.

– Czy możesz mnie jakoś wesprzeć? – teraz zorientowałem się, że nikła siła jej głosu częściowo wynikała z zawstydzenia. – Przepraszam, że przeszkadzam!

Była bardzo drobną kobietą. Niewysoka, blada, z siwymi, rzadkimi włosami opadającymi z ovalnej, pochylonej głowy. Miała po-

marszczoną twarz. Ciemne zęby sprawiały wrażenie jakby wypadały, jak gdyby wychudzona twarz nie była w stanie ich utrzymać. Spróbowałem na podstawie jej wyglądu ocenić wiek. Była jedną z tych osób, które z pewnością szybko się starzeją. Może sześćdziesiątka z wyglądem siedemdziesiątki? Tak właściwie to czy jej wiek jest istotny? Jej niewielka klatka piersiowa, na której nie można było zakładać istnienia piersi, była płaska i koścista. Kości jej ramion sterczały niczym szczyty z obu stron chudej szyi w górnej części kręgosłupa. A oczy były bez wyraźnego koloru: coś pomiędzy szarością i brązem, z białą aureolą otaczającą żrenicę. Ubrana była w szarą, zniszczoną koszulę, której materiał rozlaził się w kilku miejscach. Spódnica, dłuża do połowy kolana, była tak sfatygowana, że koloru nie udało się odgadnąć.

W czasie powszechniej społecznej izolacji z powodu pandemii zebranie było jeszcze trudniejsze, ponieważ na ulicy nie można było prawie znaleźć warunków do przeżycia. Bieda stała się jeszcze większa niż zwykle. To społeczeństwo powinno pomagać, ponieważ rządzący byli zbyt zajęci innymi sprawami w swoich pałacach.

– Proszę chwilkę poczekać, coś przygotuję – odpowiedziałem zawstydzony niemal na równi z nią. Zwiesiła głowę jeszcze niżej o kilka centymetrów.

Wszedłem do domu i przygotowałem skromny posiłek. Owoc, chleb z masłem, plastikowy kubek z kawą i mlekiem. I dodałem kilka monet. Po drugiej stronie ogrodzenia wzięła wszystko chętnie. Wstydziłem się podawać jej paczuszkę między prętami dlatego otworzyłem bramkę ogrodzenia i wzięła ją zbliżając się do mnie. Jeszcze zawstydzony wróciłem na posesję domu i zamknąłem bramkę. Nie odeszła natychmiast. Spojrzała na ziemię, na mnie i odniósł mi wrażenie, że chce mi coś powiedzieć swoim cicheńkim głosem. Poczekałem chwileczkę przed domem. W końcu zamruczała cichutko:

– Co za straszna sprawa ten wirus!...

– Zgadza się, straszna!

– Czy to długo potrwa?

– Kto wie?...

– Ciężko żyć.

– Mogę sobie wyobrazić. Wielkie cierpienie.

Znów zamilkła medytując. Wydawało się, że szuka odpowiedzi na płytach chodnika. Po kilku sekundach znów spojrzała na mnie i jeszcze ciszej powiedziała:

– Ładnie pan pachnie perfumami.

Popadłem w zakłopotanie! Czy dobrze usłyszałem? Ja, pachnący? Nie wiedziałem co odpowiedzieć. Po tych słowach odeszła wolnymi, ociągającymi się krokami. Zamyślony wróciłem do mojego śniadania. Nie miałem zwyczaju polewania się perfumami, nigdy tego nie robiłem. Ograniczyłem się dzisiaj do umycia twarzy po przebudzeniu i to zwykłym mydłem toaletowym.

Pachnący? Czy dobrze słyszałem?

Na polski tłumaczyła Elżbieta Karczewska

Aŭtoro: Wojciech Bardzik

Marko K. diris...

Oni ne devas timi viruson, ĉar ĝi, simile al ni, ĝi estas parto de nia Planedo. Interese, ke la difino informas pri ĝia ebleco de multobligo sen „nutranto”. Tio signifas, ke viruso laŭ la teorio de Darvino aŭ ekestis sur la Tero kun aliaj vivantaj organismoj aŭ estas malmatura efiko de evoluo. Pripensante la aferon pozitive homo ricevis de la vivo ordonon laŭdi la miraklon de la surtera vivo kaj diferencigi bonon kaj malbonon. Tiusence: ĉu oni povas timi tion, kio stimulas vivon? Kompreneble farante ĉion laŭ la reguloj de higieno, fiziologio, principoj de socia kunvivado ni havas grundon por timo. Fortaj organismoj venkas, plimalfortaj eĉ havante helpon de fortuloj – foriras.

Mi ne timas kaj ne timis virusojn. Ekzistas io pli malbona ol viruso. Tio „io” estas agoj de homo. Kompreneble temas pri fortaj homoj. Reganta officiale persono ne interesiĝas pri la vidpunkto de malfortaj regatoj. Tiujn regantojn mi timas, ĉar ili ne estimas min. Mi estas bezonata al ili nur por pligrandigi iliajn „egoojn” simile al viruso bezonata estas vivanta organismo. Kaj similajn „vivantajn” organismojn: – malkomplikajn, obeemajn, pensantajn amase – oni „semas” abunde. Kaj ankoraŭ unu grava afero. Por bone zorgi pri „ŝafaro” oni devas sekvi la regulojn de bona ŝafisto. Kio okazas, se la gvidanto ne havas konvenajn ecojn?

Diverskoloraj kaj diversspecaj masketoj, rezervitaj por neniu lokoj en busoj, pli da tempo por legado pro kvaranteno en la firmao –

tiaj estas pozitivaj kaj negativaj ecoj de la vivo en tiu ĉi interesa epoko. Granda maloportuneco estas por multaj desinfekto de manoj dum enirado publikajn objektojn. Okazadas de tempo al tempo, ke manhaŭto estas delikata kaj ne toleras la rimedon. Kelkaj havas tiajn problemojn vizitante bibliotekojn, naĝbasenojn, amuzlokojn aŭ oficejojn. Vi povas konsulti kuraciston pri viaj problemoj nur telefono kaj tio ĉi montriĝas malpraktika.

Viviĝis interreto kaj ĝia socio. Estas kreataj novaj grupoj, vekiĝis tiuj „dormantaj”. Eĉ en la Esperantujo oni organizas eventojn en la interreto. Por kelkaj tio ĉi signifas mobilizadon, sed aliaj sentas sin malinstigitaj. Mi persone preferas personajn renkontiĝojn kaj kompatas homojn pli aktivajn socie, kiuj solas.

Aktuale (meze de junio) en mia poŝo, krom la poštuko, troviĝas ankaŭ iomete ĉifta blanka masketo. Jam ne unu vendistino atentigis min, ke ne nur mi, sed ankaŭ ŝi pagos punon se mi ne havos la masketon.

Kaj en la laboro: se oni permesis al mi post la kontrolo de mia sanstato labori kiel specialisto pri manterapio nun mi povas diri, ke sekvaj sekurrimedoj estas malkonfirmaj al la situacio. Kompreneble oni ne povas forgesi, ke mi, kiu fanfaronas pri pandemio, estas epidemiologo – amatoro.

Malproksime de Hofburgo kaj de elstara Aŭstra Nacia Biblioteko troviĝas Esperanto-Muzeo. Palaco Mollard ne aspektas speciale impone kompare kun aliaj, apudaj konstruaĵoj. Nu, normala viena domo, tamen por homo, kiu scipovas paroli (krom la gepatran) nur unu universalan lingvon, la domo estas kiel trezoro. Mi serĉas materialojn pri Valon-gento, pri ilia vagado tra Eŭropo al Pollando kaj pri ilia sekva sorto. Valono, en Pollando nomata „Walończyk” estis edukita persono kompare kun mezepoka eŭropa loĝantaro. Alveninte al la montaro Sudety valonoj okupiĝis pri serĉado de „trezoroj”. Ili iĝis spertuloj pri geologio, alĥemio, metalurgio kaj pri la uzado de herboj.

Uzante internacian lingvon kaj sciante pri arkivoj de E-Muzeo mi skribis mesaĝon al e-bibliotekisto. Neatendite rapide alvenis la

respondo. Oni informis min, ke en la esperanta kolekto ne ekzistas informoj pri la historio de valonoj. Afabla korespondanto el la interreto proponis al mi kontakton kun belgaj, francaj aŭ germanaj esperantistoj logantaj sur la teritorioj de nuntempa Valonio. Li aludis pri profesuloj, e-klubojo, homoj-amatoroj serĉantaj historiajn dokumentojn. Mi dankis pro la informo memorante pri Marko – la volontulo, kiu laboris en nia Asocio antaŭ kelkaj jaroj. Eble li helpos min trovi materialojn pri valonoj. Aldone mi decidis analizi materialojn pri miaj hobioj ĉe UEA.

Kiel bone havi multe da libera tempo kaj je la dispono propran detektivitan oficejon situantan en grandurba blokdomo kun interreto. Kaj ĉio ĉi danke al la pandemio.

Autor: Wojciech Bardzik

Marek K. powiedział...

Wirusa nie należy się obawiać. Jest częścią naszej planety podobnie jak my. Ciekawe, że z definicji wynika iż nie może się on rozmnązać bez „ żywiciela”. Więc wirus musiał – zgodnie z teorią Darwina – albo powstać po ukazaniu się na Ziemi żywych organizmów, albo jest „ niedojrzałym ” tworem ewolucji. Patrząc na sprawę kreatywnie, człowiek został obdarowany jeszcze jednym „ przykazaniem ”, by chwalić cud życia ziemskiego i móc rozróżnić „ dobro od zła ”. Czy można się obawiać czegoś, co stymuluje życie? Oczywiście – postępując zgodnie z regułami higieny, fizjologii, zasadami życia społecznego – nie mamy podstawy do obawy. Silny wygrywa, słabszy, mimo pomocy ze strony silniejszego, odchodzi.

Nie boję się i nie bałem się wirusów. Coś innego jest gorsze od wirusa. To „ coś ” wynika z działania człowieka. Oczywiście silnego człowieka. Osoba mająca w ręku atrybuty władzy pokona każdego,

kto jest od niej choćby o przysłowiowy „włos” słabszy. Takich ludzi się boję. Bo oni nie zważają na mnie. Jestem potrzebny im jedynie po to, by tak, jak wirusowi żywego organizm, dostarczać „pokarmu” dla rozmnażania ich ego. A takich żywicieli – prostych, posłusznych, myślących regułą tłumu – „sieje” się sporo. I jeszcze bardzo ważna sprawa. Aby utrzymać „żywinę” trzeba postępować zgodnie z zasadami dobrego gospodarza. A co jeśli hodowca nie ma stosownych predyspozycji i umiejętności?

Maseczki w różnych kolorach i kształtach, wolne miejsca w autobusach, czas w pracy poświęcony na czytanie, z powodu kwarantanny więcej przerobionych książek – to plusy i minusy życia w tym ciekawym okresie. Wielką niedogodnością jest dezynfekcja rąk przy wchodzeniu do obiektów publicznych. Skóra na dloniach czasami nie wytrzymuje takiej „higieny”. Minusem będzie zamknięcie bibliotek, basenów, pubów czy wszystkich urzędów państwowych. Leczenie na „teleporadę” wydaje się niepraktyczne.

Ożył internet i wszelkie jego społeczności. Potworzyły się nowe, uaktywniły te nieco ospałe. Nawet w świecie Esperancji różnego rodzaju spotkania odbywają się w wirtualnej sieci. Mobilizuje to niektórych, lecz innych może zniechęcać. Osobiście preferuję rozmowy „twarzą w twarz”. Współczuję ludziom bardziej aktywnym społecznie.

Aktualnie – jest środek czerwca – w mojej kieszeni poza chusteczką jest również wymięta biała maseczka, bo pani ekspedientka już w niejednym sklepie zwróciła mi uwagę, że nie tylko ja zapłacę mandat, ale i ona. A w pracy: skoro ja zostałem dopuszczony do wykonywania swoich zadań i człowiek, po przeprowadzonych „badaniach”, do wykonania na nim terapii – to wszelkie ograniczenia typu zabezpieczeń przed zakażeniem wirusem są nieadekwatne do sytuacji. Oczywiście to ja, „epidemiolog” z bożej łaski, wypowiadam się na temat.

W niewielkiej odległości od Hofburga i wspaniałej austriackiej biblioteki narodowej znajduje się Muzeum Esperanta. Pałac Molłarda nie wyróżnia się specjalnie ani wyglądem, ani wielkością. Ot,

zwykła wiedeńska kamienica, jednak dla człowieka znającego tylko jeden (poza ojczystym) język obcy jest to skarb niewyceniony! Poszukuję materiałów związanych z Walonami, z ich wędrówką przez Europę do Polski i dalszymi losami tej ciekawej grupy etnicznej. Walon, a pospolicie Walończyk, ze swoją wiedzą wyróżniał się spośród średniowiecznej europejskiej ludności. Przywędrowawszy w Sudety stworzył – mówiąc dzisiejszym językiem – grupę zawodowych poszukiwaczy skarbów. Poza tym był geologiem, zielarzem, alchemikiem, metalurgiem.

Z racji uniwersalności języka i archiwaliów wiedeńskich, napisałem maila do bibliotekarza u Mollarda. Nie spodziewałem się szybkiej odpowiedzi, lecz ją otrzymałem. Poinformowano mnie, że w zbiorach esperanckich na interesujący mnie temat (historia Walonów) nie ma odnośników. Jednak uprzejmym człowiekiem po drugiej stronie SIECI podpowiedział kontakt z esperantystami z Belgii, ewentualnie Francji czy Niemiec zamieszkującymi obecne terytorium Walonii. Wspomniał o ośrodkach na tamtym terenie i możliwości wykorzystania ich do zgłębienia wiedzy, o klubach esperanckich, o ludziach z podobnymi do moich zainteresowaniami, o poszukiwaczach historycznych dokumentów. Zwrotnie podziękowałem za odpowiedź. Przypomniałem sobie o Marku, wolontariuszu pracującym w naszym Towarzystwie kilka lat temu. Może mi pomoże w znalezieniu informacji źródłowych na tematy walońskie. A jeszcze wymyśliłem, by poszperać wśród licznych działów zainteresowań w UEA.

Jak to dobrze mieć dużo wolnego czasu i do dyspozycji biuro detektywistyczne w wielkomiejskim bloku i sieci internetowej.

Aŭtoro: Marek Dąbrowski

Pandemio – neĉiutaga ĉiutageco

Tio, kio al homaro okazis aŭtune 2019 en la ĉina urbo Wuhan kaj poste disvolviĝis tra la mondo, tra ĉiuj kontinentoj, iĝis granda problemo por kuracistoj, specialistoj pri epidemiologio, politikistoj, informservo, ord servo en la urboj, spertuloj pri provizo, polico, armeo kaj, krom ĉio, por ni mem.

La pandemion de kronviruso [COVID-19 SARS 2], do minacon de morta malsano, kiu rapide disvolviĝas, anoncis Monda Organizo pri Sano kaj la informo mobilizis la tutan mondron.

Ĉiutagaj informoj pri infektoj, mortoj de sekvaj personoj kalkulataj po ne centoj, sed miloj ĉiutage teruris nin pri la proksimuloj kaj pri ni mem.

Teruris nin senkonsileco de scienculoj, ĥaosa serĉado de spiraparatoj, maskoj, litoj en malsanulejoj, testiloj. Eĉ mankis lokoj ĉe tombetoj (en Italuro, Usono, Brazilo).

Oni separis infektitajn homojn uzante de tempo al tempo drastajn metodojn. En televido estis montrata situacio en Ĉinio, kiam oni lutis tie la enirpordojn de grandaj konstruaĵoj. En Barato policanoj batis per bastonoj homojn, kiuj ne respektis ordonon porti maskojn. Oni fermis landlimojn ne permesante eniri al fremdlandanoj, sed, de tempo al tempo, ankaŭ al landanoj. Oni decidis pri kvaranteno por homoj havantaj kontakton kun malsanuloj, kio evidentigis ne nur malkomforta, sed ankaŭ donis okazon al seninteresa helpo de la najbaroj.

Tie, kie publika servo ne sukcesis konkrete zorgi pri homoj en la unua periodo de la pandemio, la civitanoj mem organizis bezonata helpon por aliaj. Tio okazis kiam ni ankoraŭ kredis, ke limigoj ne daŭros longe.

Kion organizis volontuloj?

– Ili aĉetas manĝaĵon kaj higienilojn lasante ĉion apud la fermi-taj pordoj de izolitaj personoj,

– Artistoj koncertis sur balkonoj, en kortoj, en la reto. Okazis senpagaj teatraĵoj, ekz. policaninoj dancis surstrate por ĝojigi infanojn izolitajn hejme pro kvaranteno.

– Volontuloj kudris maskojn por si mem, por familioj kaj por nekonataj personoj.

– Kreskis legado de libroj kaj spektado de familiaj fotoalbu-moj.

– Homoj trovis la tempon por rememoroj, meditado, tempon por edzo/edzino/partnero/partnerino kaj krom ĉio al infanoj. Estis tempo por sincera, pli longa ol normale, babilado, ludo ktp.

– Oni trovis la tempon por longe atendata renovigado de loĝejo kaj purigado de ĝiaj anguloj.

Tamen okazis ankaŭ tragedioj: familiaj kaj sociaj.

– Estis tiuj, kiuj mortis en soleco, al kiuj mankis spiraparatoj, litoj en malsanulejo, scio, kuracilo.

– Okazis familiaj kvereloj, skandaloj, memmortigoj.

– Bankrodis firmaoj, homoj perdis sian havaĵon de la vivo.

– Ekestis homoj sen vivrimedojoj.

– Mortis ankaŭ tiu, kiuj endangerigante la propran vivon savis aliajn.

– Kelkfoje homoj malbone traktis sanservistojn pro timo de infekto pere de iliaj kontaktoj kun malsanaj personoj.

Tiu ĉi neĉiutaga ĉiutageco kaj malcerteco pri venontaj tagoj nas-kis multe da novaj solvoj kaj ideoj.

– Oni mem produktis surbaze de vodko kaj alkoholo desinfekt likvaĵon, diversformajn maskojn el tukoj, puloveroj, bluzoj, ĉifonoj, paperaj vištukoj, gumoj (uzante eĉ gumojn el propraj pantalonoj).

– Transporto de manĝajo aŭ aliaj donacoj, se estis komplika, okazis, danke al spritaj inventaĵoj de homoj, per ŝnuroj, teniloj, flugrobotoj...

– Supertuton gardantan korpon oni produktis el plastaj sakoj kaj pluvmanteloj. Por gardi kapon oni uzis speciale pritrancitajn plastajn botelojn.

Mi estis ŝokita kiel la pola civitanaro dividita politike kaj reblema kontraŭ ĉiu malpermesoj ĉifoje akceptis ordonojn de la registaro kaj sanservo.

La homoj permisis esti enfermitaj. Malpleniĝis stratoj, placoj, skvaroj, parkoj, restoracioj, kinejoj, kluboj, sportstadionoj.

Eĉ en katolikaj preĝejoj oni ekakceptis malplenecon, mankon de oferaĵoj, diservojn en la interno, „dikorpon” enmanigatan sur la mano kaj ĉio ĉi okazis dum la Pasko.

Prezentado de opoziciaj partioj kaj demonstroj de civitanoj estis ege limigitaj kaj fakte ili estis prezentataj en la interno.

En lernejoj oni komencis instrui virtuale. Lernantoj, iliaj gepatroj, geavoj kaj instruistoj devis ellerni laboron en la interno.

Oni nuligis aŭ organizis rete publikajn renkontigojn, konferencojn, kongresojn.

Oni nuligis sportajn eventojn kaj futbalmaĉojn. Post la mildigo de ordonoj, dum aktualaj aranĝoj, sanitara reĝimo devas esti akre respektata.

Certe mi longe memoros malplenajn placojn, stratojn, restoraciojn, kiuj normale estas bruemaj kaj plenaj de homoj.

Eĉ en urbocentroj homoj ofte renkontadis erinacojn, sciurojn, aprojn kaj cervojn.

Renkontigojn kun proksimaj al mi personoj: la patrino, la filinoj, la genepoj okazadis je civita distanco.

Por saluti iun ni ne plu premas lian manon, sed ni tuſas lian kubuton per la nia.

Ni „suferis” pro tagoj pasigitaj hejme sen proksimuloj, promenoj je scia distanco, portado de penigaj maskoj. Unufojaj plastaj gantoj malordigis la teron en urboj.

Mi longe memoros prezidentajn elektajn kampanjojn kaj labo-
ron en elektaj komisionoj.

Okazadis kunlaboro de volontuloj kun personoj travivantaj
sian solecon, eble vivantaj kun kato kaj hundo. Ili estis separitaj de
siaj infanoj kaj genepoj. Ni proponis al ili komunajn aĉetojn, pro-
menojn, diskutojn pri pozitivaj kaj negativaj partoj de la homa vivo,
pripensojn, rememorojn kaj komunan pasigadon de tiu ĉi tempo de
malcerteco, danĝero kaj restriktoj.

Mi esperas, ke tiu ĉi malfacila tempo instruos al ni kiamaniere
kunlabori, reciproke estimi unu la alian, esti helpemaj, prudentaj,
ami nian proksimulon, sed ankaŭ kiamaniere esti simple empatia
kaj morala.

Na esperanto tłumaczyła Elżbieta Karczewska

Autor: Marek Dąbrowski

Pandemia – niecodzienna codzienność

To co nas, ludzkość, dotknęło jesienią 2019 roku w chińskim
miejscie Wuhan i rozlało się na cały świat, wszystkie kontynenty,
okazało się nie lada wyzwaniem dla lekarzy, epidemiologów, poli-
tyków, służb informacyjnych, porządkowych, logistycznych, poli-
cyjno-wojskowych i nas samych przede wszystkim.

Pandemia koronawirusa [COVID-19 SARS 2], czyli zagrożenie
szybko rozprzestrzeniającą się śmiertelną chorobą na bardzo dużym
obszarze, ogłoszona przez World Health Organization, postawiła na
bacznoscie cały świat. Codzienne informacje o zachorowaniach, za-
każeniach, śmierci kolejnych osób, liczne nie tylko w setkach, ale
tysiącach osób dziennie, w poszczególnych krajach, spowodowały
przerażenie, strach o najbliższych i siebie.

